



Programŝanĝoj kaj novaj programeroj

MARDO

Kiel efike lerni fremdajn lingvojn

12h00-13h30, salono Lapenna. Ripeto de sukcesa prelego de Lýdia Machová. La priskribon oni trovas en paĝo 44 de la Kongresa Libro. Ĉiuj lingvemuloj estas bonvenaj.

Kunsido kaj filmo de Amerika Komisiono

16h00-16h45, salono Ŝkarvan. La Amerika Komisiono invitas vin al ĝia kongresa kunsido kaj al montrado de la dokumenta filmo "Trans la Florida Markolo" pri la vizito de grupo de usonaj esperantistoj en Kubo pasintan novembron.

ĴAŬDO

Kunsido de ILEI

15h00, salono Izak.

VENDREDO

Esperantologia Konferenco

15h00-18h00, salono Kalocsay (ne plu en Lapenna, kiel anoncita en la Kongresa Libro).

Koncerto de Kim J; Henriksen

15h00-16h30, la salono Lapenna (ne plu en Hodler, kiel anoncita en la Kongresa Libro).

Hodiaŭ en la aŭtomata kinejo

09h00 – La Koloro de Lakto (Ikke naken)

10h37 – La Patro

11h24 – La Matrico (Matrix)

13h41 – La Ŝranko (Le Placard)

15h08 – La Trumanspektaklo (The Truman Show)

17h00 – Vojaĝanto tra kosmo kaj jarcento

17h47 – Esperanto: Kiel Denaskulo
(Esperanto: Like a Native)

Hodiaŭaj aŭtoraj duonhoroj

(en la Libroservo, salono Bociort)

10h00 – István Ertl

11h00 – Spomenka Ŝtimec

13h00 – Ulrich Lins

14h00 – Zlatko Tišljarić

15h00 – Amri Wandel

16h00 – Zuzka Stožická kaj Mária Minichová

17h00 – Mikaelo Bronštejn

Esperanto-arbo

Ni invitas vin al la **solena plantado de Esperanto-arbo**, kiu okazos la 26-an de julio 2016 (marde) je la 12.00 sur herbejo antaŭ la aŭlo de Slovaka agrikultura universitato en Nitro. La arbon plantos eminentuloj de Esperanto-movado kaj honoraj gastoj.



La Komitato de UEA elektis en granda unanimeco

La 42 komitatanoj kiuj voĉdonis hodiaŭ faris la elektojn en granda unanimeco.

Aldone al la komitataj reviziantoj (Ans Bakker-ten Hagen kun 39 voĉoj kaj Flory Witdoeck kun 40 voĉoj) kaj la membroj de la Komisiono pri Statutoj de la Landaj kaj Fakaj Asocioj (Mireille Grosjean kun 38 voĉoj, Ulrich Lins kun 38 voĉoj kaj Brian Moon kun 41 voĉoj) okazis ankaŭ balotoj por la estraraj oficoj.

Mark Fettes estis reelektita kiel Prezidanto (36 voĉoj por), Stefan MacGill kiel Vicprezidanto (39 voĉoj por) kaj Martin Schäffer kiel Ĝenerala Sekretario de UEA (35 voĉoj por).

Teatro

Teatraĵo "La konkero de la Norda poluso" marde la 26-an de julio 2016 je la 14:30 en salono Rosa Venu spekti la premieron de la esperanta traduko de la ŝerca teatraĵo pri Cimrmana verko.



Vi estos surprizita, kiu atingis la poluson kiel la unua!

Aŭtoro: Jára Cimrman, la plej granda Ĉeĥo Traduko: Vít Guigielmo Mišurec, Vlasta Pišúková kaj Jan Šebetovský

Senpagaj (sed en limigita kvanto) biletoj por la teatraĵoj haveblas ĉe la informejo.

Salutparolo de Ján Figel'

speciala ambasadoro de la Eŭropa Unio pri religia libereco en la mondo, dum la solena inaŭguro

Karaj esperantistoj,
estimataj gesinjoroj,

estas por mi honoro, ke mi rajtas saluti Vin kiel eksa komisionano de la Eŭropa Unio pri edukado, kulturo kaj multlingveco kaj nuntempe Speciala sendito de la Eŭropa Unio por religia libereco kaj bonvenigi Vin en la historia Nitro kiel partoprenantojn de la 101-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazas en Slovakio la unuan fojon en la ĝisnuna historio de la internacia Esperanto-movado.

Organizo de tiu ĉi grava Esperanta evento en Slovakio en la jaro 2016 dum la unua Prezidanteco de Slovaka Respubliko en la Konsilio de la Eŭropa Unio estas eksterordinara kaj signifa okazo por prezenti al la mondo nian junan kaj modernan landon, ĝian multlingvan kaj multkulturan karakteron kaj riĉan historion.

Esperanto ekde sia naskiĝo demonstris admirindan vivkapablon kaj fariĝis internacia lingvo, kiu uziĝas tra la tuta mondo kaj pozitive influas la disvolviĝon de amikeco kaj socia egaleco en la hodiaŭa maltrankvila mondo, kie disvastiĝas esprimoj de perforto, netoleremo, malamo kaj ekstremismo. Mi antaŭvidas, ke ankaŭ tiu ĉi kongreso en la senco de sia ĉeftemo „Socia justeco – lingva justeco“ kontribuos al la disvolviĝo de amikeco kaj reciproka interkomprenado inter la nacioj.

Mi aprezas, ke la Esperanto-movado ankaŭ dum tiu ĉi sia monda kongreso malfermiĝas al la faka kaj laika publiko de la mondo pere de paralele okazantaj fakaj aranĝoj. Mi menciui la morgaŭan Interreligian forumon en Centra Eŭropo okazontan en Nitro, en kiu esperantistoj kaj ne-esperantistoj, kredantoj kaj nekredantoj, sin dediĉos al gravaj kaj tre aktualaj temoj de la hodiaŭa evoluo, kiel ekzemple paco kaj sekureco, migrado kaj integriĝo, malriĉeco kaj disvolviĝo, samkiel interreligia dialogo. Mi partoprenos tiun ĉi forumon kune kun multaj el Vi.

Devizo de la eŭropa integriĝo estas "unueco en diverseco". Tio estas universala principo, kiu baziĝas sur la imago de ununura, tuthoma familio, en kiu ĉiu persono estas posedanto de egala digneco, kaj samtempe originala, aŭtentika kaj neripetebla individuo. Vivi kaj disvolvi tiun ĉi devizon en la nova jarcento signifas komprenadi, respektadi kaj disvolvadi malsamecojn – lingvaj, kulturajn, religiajn, kaj samtempe serĉadi kaj plifortigadi tion, kio estas komuna, vera, justa kaj tamen bona. Ĉar la vero estas la bazo de justeco kaj libereco. Kaj la paco estas la frukto de justeco. Ĝuste ĉe tio povas via movado kaj via lingvo ludi tre valoran rolon de faciliganto. Ankaŭ via movado kun siaj riĉaj spertoj kaj efikaj instrumentoj por homa interkompreniĝo kaj reciprokeco povas kontribui al tio, ke la jarcento de genocidoj finiĝu kaj anstataŭiĝu per jarcento de homeco. Temas pri granda, eĉ eksterordinara defio por alia evoluo en la mondo. Alia evoluo tamen postulas aliajn sintenojn, alian konduton.

Estimataj gesinjoroj, permesu al mi, ke mi deziru al Vi

sukcesplenan diskutadon dum la Universala kongreso de Esperanto en Nitro. Ke ĝi kontribuu al tio, ke en la mondo estu malpli da timo kaj indiferenteco, kaj pli da vera homeco kaj respondeca solidareco. Tiajn perspektivojn kaj klopodojn ni bezonas, eĉ devas evoluigi ĝuste el dankemo pro la libereco kaj la longa periodo de paco, kiun ni en Eŭropo travivas. Kaj ankaŭ pro tio, ke por multaj homoj kaj nacioj en la mondo estas tia ĉi realaĵo hodiaŭ tre malproksima. "La mondo ŝanĝeblas!", estis ofta alvoko de ano de nemalproksima Pollando, la sankta papo Johano Paŭlo la 2-a. Pozitiva ŝanĝo necesigas kuraĝon kaj aŭdacan agadon. Mi deziras al Vi kuraĝon kaj aŭdacan, al Via nitra kongreso bonajn rezultojn kaj al la tuta Esperanta movado perspektivajn, evoluajn tendencojn!

Mi dankas al Vi pro via atento kaj deziras al Vi ĉion bonan.

Salutparolo de Štefan Rozkopál

estro de la Oficejo de la prezidento de Slovakio

Estimataj partoprenantoj de la 101-a Universala Kongreso de Esperanto, karaj amikoj!

Permesu al mi, unuavice bonvenigi vin ĉiujn en la nomo de la prezidento de Slovakio respubliko, sinjoro Andrej Kiska, en Slovakio kaj samtempe en unu el niaj plej signifplenaj historiaj urboj – en Nitra, en la urbo, kiu staris ĉe la unuaj politikaj provoj de niaj antaŭuloj, en la pli vasta senco de tiu ĉi vorto, pri propra lingvo kaj per tio ankaŭ pri propra kulturo; kaj el tiuj ĉi unuaj provoj ni ja ĉerpas ĝis nun.

Pro tio mi nemezureble ĝojas, ke ĝuste tie ĉi, en Nitra, komenciĝas io nova – la nova jarcento de Universalaj Kongresoj de Esperanto, lingvo, hodiaŭ ankaŭ vivkapabla portanto de vivaj kaj dinamikaj kulturaj manifestaĵoj de la homoj en la tuta mondo; lingvo de interkompreniĝo, lingvo de la paco, kiu malfermiĝas ne nur al pli vasta publiko, sed ankaŭ al la influoj de ĉiutagaĵoj kaj grandaj historiaj eventoj, kiujn ni travivas kaj tutcerte ankaŭ travivos.

Ĉar nekonsiderante tion, de kie ĉiu el ni devenas, ni estas socio dependa de interkompreniĝo. Kaj preskaŭ ĉiu el kaj malgrandaj kaj grandaj aferoj, per kiuj ni vivas, havas sian lingvan realigon, respugulon en la lingvo, kiu estas nia gepatra, aŭ fremda, per kiuj ni lernas nomi la aĵojn en nia eno kaj ĉirkaŭ ni.

Hodiaŭ tamen al mi ŝajnas, ke ni por egalaj aferoj uzas egalajn vortojn – sed ĉiam pli ofte kun alia signifo. Tio estus en ordo, se tiu ĉi diferenco ne estus iam abisma, se ĝi nin unu de la alia, unuopulojn aŭ la tutajn komunumojn, konscie ne malproksimigadis. Se ĝi ne estus ilo de potenco kaj iam-tiam superflua idologia batalo.

Pro tio ĉio, kio helpas al ni pli bone kompreni iu la alian, pli bone kompreni la signifon de tio, kion ni havas komunan, tion ni simple tre bezonas. Por ke ni kapablu kontraŭstari al la artefaritaj baroj inter ni, inter nacioj kaj ŝtatoj. Por tio mi tre deziras, ke tiu ĉi kongreso fariĝu forta impulso por ĉiam forta sento kaj kompreno de tio, kion ni havas komunan kaj kio nin kunligas.

Slovaka gazetaro pri UK

Jam vendrede, antaŭ la kongreso, eldonis la Gazetara Agentejo de Slovaka Respubliko raporton "En monda kongreso de Esperanto en Nitro renkontiĝos 60 landoj". Ĝi citas la LKK-prezidanton Peter Baláž kaj la urbestron Jozef Dvonč kaj invitas al la publika programo kaj la akompanaj aranĝoj

Dum julio Centro estos tutmonda – tiel titoloĝas artikolo en la informilo Centro Nitra. Oni klarigas ke Esperanto estas lingvo, kiu celas interkomprenigi diversajn popolojn sen lingva diskriminacio, ĉar ĝi apartenas al neniu popolo, sekve apartenas al ĉiuj. Kiel regula lingvo ĝi lerniĝas kiel amuzilo, ne kiel peza laboro.

Ĉu Esperanto anstataŭigos la anglan? En kongreso en Nitra esperantistoj okupiĝos pri solvo de lingva justeco anoncas artikolo de la gazeto *Ženy v mieste* (Virinoj en la urbo). Esperanto estas la plej facila lingvo, kiun vi povas lerni dum tri monatoj, sentalentuloj dum ses. Poste vi pli facile lernos ankaŭ aliajn lingvojn. S-ino Lýdie Machová komencis lerni Esperanto pro scivolemo. Ŝi lernis ĝin dum monato ka jen la kongreso ŝi prelegos unu horon pri lingvoj. Samloke science pri Esperanto informis slovakinio Eva Poláková, pri ĝiaj lingvistikaj trajtoj kaj pri familia uzo informis Věra Barandovská-Frank kaj sinjoro Vladimír Rataj el la Slovaka agrikultura universitato rememoras pri Esperanto-tendaroj dum sia junaĝo.

Aktualne.sk alportas interparolon kun la prezidantino de la slovaka Esperanto-junularo Zuzana Kožuchová. Ankaŭ ŝi parolas pri facileco de Esperanto, sed aldonas, ke ekzistas ankaŭ literaturo, teatro, kantoj, filmo kun esperantlingvaj subtitoloj. Turistoj ne bezonas iri al hoteloj, ĉar ili trovas loĝadon ĉe esperantistaj amikoj. Intereson pri Esperanto dokumentas Duolingo kun 426 000 da kursanoj.

Moja Nitra (Mia Nitro) raportas pri gazetara konferenco okaze de la 102-a UK. Peter Baláž klarigis, ke la unuan fojon okazas universala kongreso de Esperanto en Slovakio. Kaj kvankam Nitra estas malgranda urbo kompare kun aliaj, historie ĝi estas grava, ĉar en ĝi komenciĝis historio de slovakinio kaj de la slovaka skribo. Atendataj estas pli ol mil homoj, estos koncertoj, teatro, diversaj metiejoj kaj prelegoj.

Krome, la anglalingva gazeto celanta ĉefe eksterlandanojn vivantajn en Slovakio, *The Slovak Spectator*, reklamis la kongreson en la angla lingvo per artikolo titolita "Monda Esperanto-Kongreso Nitro antaŭvidas 1400 vizitantojn el 60 landoj".

Dimanĉe la Gazetara Agentejo de Slovaka Respubliko aperigis duan amaskomunikilon, kies titolo "Esperanto famigis Reklamon al silento tra la tuta mondo" aludas pri la fama slovaka muzikgrupo Team, kies manaĝero dum jardeko estis slovaka esperantisto Stano Marček kaj kiu unuafoje internacie famiĝis kun Esperantigitaj tekstoj dum la UK 1989 en Brajtono. La artikolo tuŝas la historion de Esperanto en Slovakio kaj ĝian hodiaŭan uzon kaj raportas detale pri la speciala poŝtmarko kaj rilataj poŝtaj produktoj eldonitaj tiutage de la Slovaka Poŝto okaze de la kongreso.

Nefumantoj atentis pri danĝeroj de fumado

TADEN havis ne nur standon en la Movada Foiro, dividitan kun LIBE (vidhandikapitoj), sed ankaŭ jam dimanĉe kunvenis en Izák.

Ĉeestis membroj el Ĉeĥio, Germanio, Italio kaj Nederlando por eta jubileo, ĉar antaŭ 20 jaroj nia "Agado" en la praga UK fariĝis "Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj".

La relativa apudeco ebligas al nia pioniro Jiří Rado partopreni. Ankaŭ lia kunfondinto Barr Ruigrok el Nederlando donis vivosignon.

La ĉeestas germana instruisto sciigis ke malkreskis la fumado inter la leŭmantoj. Evidente la publika sinteno komencas ŝanĝiĝi.

En la disdonita numero 1 de "Puraj Pulmoj ĉi-jara la vizaĝlibra adreso bezonas kompletigon: www.facebook.com/jan.bemelmans

Cetere ni atentigis pri grava scienca esploro en Nederlando laŭ kiu la jara kosto de fumado perdigas al nederlandanoj po 2 000 €. En longa listo da kanceraj kaŭzataj de fumado troviĝas pluraj laŭ freŝdataj konstatoj: hepato kaj eĉ mamoj suferas. Ĉi-lastata malkovro kontrastas kun antaŭaj asertoj pri senrilateco. Nun evidentiĝis, ke unu el 9 kazoj rezultas el fumado. Temas pri 1200 viktimoj jare nur en Nederlando.

Nefumantoj meznombro valorigs sian staton per 88 el 100 poentoj, fumantoj klare malpli 77.

Plej ŝokis ke daŭre i.a. en sudaj usonaj ŝtatoj infanoj estas ekspluataj en tabakplantejoj kaj ke tutmonde "pasivaj" fumantoj viktimiĝas: 600 000, kompare kun 6 milionoj da fumantoj. Fine nia itala membro konsilis estonte inviti fumantojn al la kunvenoj de TADEN.

Raportis Rob Moerbeek, kn 41.

Raporto pri kunsido de LSG

Dimanĉe okazis kunsido de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj (LSG). La ĉeestantoj priparolis la nunan situacion en la Ligo, precipe la eldonadon de ĝia revuo "Forumo". Bedaŭrinde, ĉi-jare ne okazos la kutima akcepto ĉe loka GLAT-organizaĵo, ĉar tia ne ekzistas en Nitro. La ligoj invitas por renkontiĝi ĉe biero, komuna ekiro al drinkejo okazos mardon, la 26-an de julio je 20h00 de antaŭ la ĉefa enirejo de la kongresejo.

Paweł Fischer-Kotowski, KN 142

Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Dimanĉe, la 24an, okazis la Ĝenerala jarkunsido de Esperanta Jura Asocio (EJA), kies tagordon parte konsistigis gravaj eroj. Interalie estis tie diskutita kaj aprobita projekto de nova statuto de EJA.

Ĉi-projekto, redaktita de la prezidanto de EJA, estis poste kelkpunkte modifita pere de reta dialogo inter la prezidanto kaj la eksa prezidantino (nuna sekretariino) Doktorino Rafaela Urueña kaj krome stile polurita de la pamasano Gonçalo Neves.

La statuto estis aprobita kun kelkaj modifoj. La plej gravaj

modifoj koncernas la celaron (ekz.: kiomeble perfektigi la juran terminologion en Esperanto; profundigi kaj disvastigi la konon kaj konscion pri la enhavo kaj signifo de lingva demokratio, ankaŭ rilate al indiĝenaj, malfavorataj kaj minoritataj lingvoj; fortikigi la pliligitecon inter la Asocio kaj aliaj internaciaj kaj naciaj juraj aŭ juristaj asocioj kaj similaj estaĵoj) kaj koncernas la membraran amplekson kaj kotizreĝimon.

La prezidanto, advokato Miguel Faria de Bastos (KN 133), opiniis la novan statuton “revoluciiva”.

La nomo de la Asocio laŭstatute iĝis de nun Internacia Jurista Esperanto-Asocio (IJEa).

Ene de la tagordo, estis ankaŭ aprobita propono aljuĝanta la statuson de honoraj prezidantoj de IJEa al la eksaj UEA-prezidantoj kaj eksaj EIA/IJEa prezidantoj Ivo Lapenna kaj Keppel Enderby.

Tajĝiĉuano

Lunde 15 interesitoj sekvis prezonon de Matti Lahtinen (kn 423, ultmar@suomi24.fi) pri la ĝenerala sistemo por lukto, sano, kaj harmonio de korpo kaj menso.

Estos matenaj ekzercoj je la 7-a matene antaŭ la konstruaĵo Bernolák.

Esperanto-kurso ĉe Duolingo

Pri Esperanto-kurso ĉe Duolingo prelegis ĝia kreinto Chuck Smith. Ĉiutage aliĝas mil personoj, el kiuj tridek sukcese finas la kurson. La kurso estas anonima, tial ne eblas diri, kiuj konkretaj kursanoj estas el konkreta lando. Tamen oni scias, ke la kurso plej furoras en Usono inter 18-25-jaruloj, kiuj ne ŝatas klubojn kaj asociojn, sed kreas mem retajn strukturojn kaj komunumojn. Ekzemple en diskutejo Telegramo estas 750 esperantistoj, plejparte el Duolingo, kiuj tie kreis propran komunumon. Tamen ankaŭ UEA klopodas interesigi la kursfinintojn per diversaj proponoj. Oni kalkulas ankaŭ kun versioj en aliaj mondlingvoj. Estas jam preskaŭ preta la hispana versio, oni planas rusan, ĉinan, francan, germanan.

Bronŝtejn – Handzlik: dubarda programo

Marde la 26-an de julio je 15h00, salono Lapenna

Pasintomere en Lille vagadis senokupe du bardoj – unu sen barbo, la dua – kun tiu.

Kaj venis al ili komuna opinio, ke la barda kanto estas maljuste preteratentita en la programo de UK-oj. Kaj vens al ili komuna decido: prezenti la ĉarmon de la bardaj kantoj en Nitro.

Di, ni invitas vin al la unika duhora koncerto. Venu por ĝui la kantojn – prudentajn kaj ŝercajn, lirikajn kaj moketajn. Certe, la bardlanta etoso plaĉos al vi.

Publika kunveno de Eo-ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaĵ-kolektantoj invitas ĉeesti la kunvenon de ELF-AREK, mardon, je la 11-a/12h30 en salono ZVARA.

Novaj Aliĝintoj

1222	S-ino Ema Dunai	Serbio
1223	S-ro Laslo Dunai	Serbio
1224	S-ro Lajos Gothard	Usono
1225	S-ino Cornelia Kaiser	Aŭstrio
1226	S-ro Filip Ŝeatović	Kroatio
1227	S-ino Laura Ŝeatović	Kroatio
1228	S-ro Simon Hallinan	Aŭstralio
1229	S-ro Mirosław Dziejdzic	Pollando
1230	S-ro Serhij Prudko	Ukrainio
1231	S-ro Ulrich Wilke	Germanio
1232	S-ro Adrien Meslet	Francio
1233	S-ro Luiz Fernando Puhl	Brazilo
1234	S-ino Sara Konnerth	Rumanio
1235	S-ro Shahid Rashid	Britio
1236	S-ino Okada Fumiko	Japanio
1237	S-ino Norina Florineth	Aŭstrio
1238	S-ro Leszek Czerwiński	Hungario
1239	S-ro Henriksen Toke	Danlando
1240	S-ro Saito Yoshinori	Japanio
1241	S-ino Aleksandra Watanuki	Japanio
1242	S-ro Sándor Mészáros	Hungario
1243	S-ro Aivars Kalniņš	Latvio
1244	S-ro Renato Guedes Filho	Brazilo
1245	S-ino Sylwia Pöhlmann	Germanio
1246	S-ro Edward Kozyra	Pollando
1247	S-ino Stanisława Zielak	Pollando
1248	S-ro Xose' Lourenzo Vidal	Hispanio
1249	S-ro Seyed Amir Mirjavadi	Irano
1250	S-ro Pedro Paulo Freitas	Brazilo

Ekspozicio de pentraĵoj

Ni malfermis novan ekspozicion de pentraĵoj en la koridoro de UK centro. En la urbo Tata (Hungario) fondiĝis Esperantista Pentroista Grupo, kiu pentris pri urboj Nitra kaj Tata.

Elizabeta Ködmön, KN 804

Limeriko post alveno

Megeroj en hejmo studenta
sen ajna helpemo klienta
kriaĉas kolere
dum horo vespere
pro sia malico turmenta.

Russ Williams, KN 511

Elŝutu la ciferecan version de Pribina!

Fotu la jenan kodon per via poŝtelefono por elŝuti tiun ĉi kaj la aliajn numerojn de la Kongresa Kuriero.

